N. N. 32,

Jen ĉiamviva Rozo

tradukita de Leland Bryant Ross

Jen ĉiamviva Rozo
laŭ vorto de profet'
El la Jiŝaja ŝoso
ekkreskis kun impet'.
Ĝi venis, hela Flor',
en frida tempo vintra
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,
la menciita Flor';
Maria ĝin responsis
el patrin-ama kor'.
Ŝi naskis Rozon por
klarigi Dian amon
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro
per sia dolĉ-arom'
Heligas per Digloro
la vojon de la hom'.
Ja homo, tamen Di',
ĝi ŝarĝojn malpezigas
Kaj homojn savas ĝi.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Leland Bryant Ross *(Ros' Haruo).*

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en `http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html`. *Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub* `http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html`. *Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon* `https://www.facebook.com/leland.ross/photos`.

N. N. 32,

Rozbranĉo forĝermadis

tradukita de Felix Ney

Rozbranĉo forĝermadis
el trunk' de nobelec'.
Prauloj jam kantadis:
de Jiŝaj ĝia spec'.
Floreton portis ĝi,
en akra vintro estis,
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita
Jesaja de profet':
Maria netuŝita,
de kiu la floret'.
Eterne volis Di':
naskinta infaneton
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro
alvenas bonodor'
Ĝi brilas en la koro,
mallumon pelas for.
Homido, Dia Vort',
nin el sufero helpas,
De pek' Savant' kaj mort'.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo `http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html`.